La 23an de septembro 2015

Manifestacioj okazas en diversaj lokoj en Japanio

(1)

Manifestacioj por protekti la 9an artikolon de la konstitucio

Vespere inter la 6a kaj la 8a horoj la 18an de septembro mi estis antaŭ la parlamentejo en la mezo de Tokio kaj kriadis kontraŭ nia ĉefministro Abe kaj lia militisma politiko. Jam ekde la Japana Katastrofo en 2011 ĉiun tagon okazas manifestacioj antaŭ la parlamentejo: kontraŭ refunkciigo de

nukleaj centraloj, kontraŭ plialtigo de konsuma imposto, kontraŭ malbonigo de laborkondiĉoj kaj nun kontraŭ la militisma leĝaro proponita de li kaj lia kabineto.

La 9a artikolo de la japana konstitucio malpermesas militon, kaj sekve posedon de armeo. Tuj post la dua mondmilito Japanio ne posedis armeon, sed Usono ŝanĝis sian politikon, kiam la malvarma milito komenciĝis. Usono trudis al Japanion fondon de armeo, kaj Japanio akceptis ĝin, sed laŭ la konstitucio la registaro ne povis nomi ĝin kiel armeon, do nomis ĝin kiel "Defendan korpuson". Kaj la registaro pledis, ke ĝi estas nur por defendi Japanion okaze de invadoj fare de aliaj landoj, sed ne por militi aŭ batali eksterlande.

Dank' al la konstitucio Japanio neniam militis dum 70 jaroj post la dua mondmilito. Ĝi povis rifuzi postulojn de Usono pri kunbatalado. Koreio ne havas tian pacan konstitucion, do ĝi devis partopreni en la Vjetnama Milito laŭ la peto de Usono, kaj soldatoj mortis kaj mortigis. Okaze de la Iraka Milito, Japanio ne povis rifuzi postulon de Usono kaj sendis defendkorpusanojn al Irako, sed ili ne batalis, helpante suferantajn loĝantoj for de la batalejoj.

*En efektiveco ili transportis usonajn soldatojn kaj materialojn al la batalejoj, do fakte helpis la usonan militon. La registaro kaŝis tiujn faktojn, kaj ŝajnigis al la popolanoj, ke Japanio helpis nur suferantajn loĝantojn. Tiuj trupanoj senditaj al Irako poste mortigis sin pro psika traŭmato pli multe ol la averaĝo.)

La ĉefministro Abe, volante, ke Japanio pli "pozitive" kontribui al la mondpaco, proponis leĝaron, kiu ebligas sendi defendkorpuson al eksterlando, sekvante Usonon. Tiu propono estas tute kontraŭ la ĝisnunaj sinteno de la registaro

kaj interpreto de la konstitucio. Ĝis nun Japanio estas lando, kiu ne militas, sed ekde nun Japanio fariĝos lando, kiu militas.

Multaj homoj kontraŭas la registaron. Manifestacioj organiziĝis ĉie en Japanio. Scienculoj, universitatanoj, advokatoj, eksaj juĝistoj, instruistoj, aktoroj, studentoj kaj lernantoj, patrinoj… en ĉiu kampo leviĝis voĉoj kontraŭ la leĝigo, do eĉ la ĉefministro mem konstatis, ke lia intenco estas ne bone komprenata de la popolanoj, sed li kaj la regantaj partioj (Liberala Demokratia Partio kaj la religia partio Koomei) aprobigis la leĝaron frumatene la 19an de septembro.

Tio estas tre bedaŭrinda afero, sed ni ne estas malkuraĝigitaj. Dum tiu batalo junuloj, kiuj antaŭe ne havis intereson pri politiko, vekiĝis kaj fariĝis la ĉefa motoro de la movado. Junaj patrinoj organizis manifestaciojn kaj agadis

en la tuta Japanio. Scienculoj pri la konstitucio, kunlaboronte kun mil samideaj scienculoj, metos la aferon al juĝo por ke la tribunaloj juĝu la leĝaron kontraŭkonstitucia.

Nia konstitucio naskiĝis el nia profundaj bedaŭro kaj memkritiko, ke Japanio invadis aziajn landojn kaj suferigis multegajn azianojn kaj ke dume tri milionoj da japanoj mortis. Do nia konstitucio estas deklaro kaj promeso al aziaj landoj, ke ni ne plu militu kaj vivu pace. Do renversigi tiun ideon estas perfidi aziajn popolojn.

La ĉefministro Abe ne ŝatas tiun "postmilitan reĝimon" sub la konstitucio "trudita" de Usono, kaj promesis, ke li kreos "belan Japanion". Estas fakto, ke la konstitucio naskiĝis sub la influo de la usona okupantaro, sed en efektiveco ĝi naskiĝis de la longa batalo de japanoj por demokratio, kaj estas grave, ke la japana popolo aprobis ĝian valoron kaj ĝuis pacon sub ĝi dum 70 jaroj post la milito. Plejmulto de la popolanoj neniam volas nuligi la naŭan artikolon por ke Japanio povu militi.

Mi kaj ankaŭ multaj japanoj ne komprenas, kial Abe, kiu volas liberiĝi de la "trudita" konstitucio, mem eniras en la militan ombrelon de Usono kaj povos mortigi japanajn defendkorpusanojn en la usonaj militoj for de Japanio. Ĉu tio estas "bela Japanio", kiun li volas krei? Li estas frenezulo same kiel Hitlero kaj liaj subtenantaj ministroj estas Goebbels kaj Goering.

Foto: “Revenigu la antaŭmilitan Japanion!” (parodio)



La societo de la naŭa artikolo en mia distriko faris du flagojn kun la subskriboj de la partoprenantoj, kaj sendis unu al Abe.

Impresaj vortoj

Dum tiu batalo kontraŭ Abe, mi legis multajn impresajn vortojn. Mi notos tiujn.

1. S-ro Kobajaŝi Hidenori, asembleano de Liberala Demokratia Partio de la gubernio Hiroŝima (la ĵurnalo Akahata la 9an de aŭgusto)

Kiam mi estis lernanto, mi diris al mia patro: “La centro de Japanio estas Tokio”. Mia patro respondis: “Ne. La centro de Japanio estas la japana konstitucio. La nuna Japanio naskiĝis de la konstitucio”.

2. S-ino Kurimoto Jooko de Kioto (la ĵurnalo Akahata la 9an de aŭgusto)

Unuan fojon ekde mia naskiĝo

Mi decidis protekti miajn filon kaj nepon.
Mi, hodiaŭ matene.
(Fino de ŝia poemo “Unuan fojon ekde mia naskiĝo)

3. S-ino Ĉibana Kurara, modelo (la ĵurnalo Mainiĉi la 14an de aŭgusto)

Ĉiuj niaj gepatroj postvivis la kruelan militon, kaj de ili ni ricevis vivon. Ĉu tiu penso ne donas al ni kuraĝon?

4. S-ro Oobajaŝi Nobuhiko, filmreĝisoro (la ĵurnalo Akahata la 9an de septembro)

Nia estas la unua generacio, al kiu estas permesata krei pacon. Ni vivu ne laŭ “justeco” trudita de supre, sed laŭ racio. Tio estas mia filozofio kiel knabo post la milito.

5. S-ro Morimura Seiiĉi, verkisto 82-jara (la ĵurnalo Asahi la 13an de septembro)

Tiuj, kiuj ne konas militon, des pli volas okazigi militon.

6. F-ino Jazaŭa, 17-jara lernantino (la ĵurnalo Akahata la 19an de septembro)

Tiuj, kiuj agadas por mono kaj profito, tuj ĉesos agadi, kiam tiuj ne venos, sed ni, kiuj agadas memvole, agadas, kiam tio estas necesa. Se hodiaŭ ni ne sukcesas, ni agados morgaŭ, kaj se morgaŭ ni ne sukcesos, ni agados postmorgaŭ. Tiuj, kiuj efektivigas demokration, estas ni.

7. S-ro James Miki, dramisto (la ĵurnalo Mainiĉi la 18an de septembro)

La japana konstitucio baziĝas sur la bono de la homa naturo. Ĝi deklaras, ke Japanio ne militu, fidante la sanan prudenton de la mondo. Tial ĝi nomiĝas “paca knstitucio”. La proponita leĝaro de Abe baziĝas sur la malbono de la homa naturo, ĉar ĝi timigas la popolanojn, minacante ilin per vortoj, ke la aliaj landoj iam ajn povos okazigi malbonaĵon al Japanio

8. Instruistino 35-jara de Tokio (la ĵurnalo Akahata la 19an de septembro)

Al infanoj, kiuj naskiĝis nur por efektivigi pacan estontecon, mi ne volas doni danĝeran estontecon.

9. S–ro Janagisaŭa Kjooĵi, eksa vicĝenerala sekretario de la kabineto (la ĵurnalo Mainiĉi la 20an de septembro)

La defendkorpuso estas subtenata de la popolanoj, ĉar ĝi ne militas, nek mortigas. Sen plena aprobo de la popolanoj la registaro ordonos, ke defendkorpusanoj risku sian vivon. Tio estas tute malracia.

10. S-ro Haŝimoto Takaŝi 50-jara (Jokohamo, la ĵurnalo Mainiĉi la 20an de septembro)

Mi scias, ke la leĝaro estis aprobita ĉi-frumatene, sed mi venis ĉi tien antaŭ la parlamentejo, opiniante, ke estas des pli grave protesti en tiu ĉi mateno. Silenta plejmulto nun vekiĝis. La leĝaro ja estas aprobita, sed la vera batalo komenciĝis de hodiaŭ”.

HORI JASUO